



# «LE GROUPE ESPERANTO DU MAINE» SALUTAS VIN!



*Bonvenigaj vortoj*

*«Ne freneziĝu serĉante perfektan,  
kelkaj difektoj estas gravaj»*

**Paulo Coelho**


*Enhavo*

Zamenhofa Tago 2023 en Distilejo	P1
Lingva evoluo de F.Mintz	P2-3
Tsimane kaj koloroj	P4
Homaj Rajtoj kaj CED	P5



Okaze de nia loka Zamenhofa tago 2023 ni vizitis la Distilejon «Du Sonneur» en la Urbo le Mans

Sed ĉu vi scias kial ĝi estas tiel nomita ?



Distililo **Arnold Holstein** el Germanio

**1887-2023**

**La artefarita lingvo Esperanto (\*) kaj evoluo de kvar naturaj lingvoj kaj fina noto kun Kartezio**

Frank mintz

\*) Zamenhof ĉiam uzas «universala lingvo» pri Esperanto kaj pri aliaj lingvoj kiel volapük, ido, ktp. «Naturaj lingvoj» signifas oficialan lingvon de iu lando; «artefarita lingvo» estas lingvo farita pere de la lerta laboro de lingvistoj. Ĝi ne havas la signifon de «artifika lingvo» aŭ «supraĵa lingvo». En la franca lingvo la vorto «artificiel» havas ambaŭ signifojn: artefarita kaj supraĵa, sed la plej ofta signifo estas supraĵa...

La resumo de tiu artikolo estis prezentita la 16an de oktobro 2023 dum la ĉeesto de nia klubo en «La Maison des langues» en la universitato de Le Mans. Dekoj da studentoj kaj la Prezidanto de la universitato aŭdis partojn de tiu ĉi resumo.

Legu la unuan parton p 2-3

## Vizito al La Distilejo "du Sonneur"

La distilejo *du Sonneur* estas distilejo en la urbocentro de *Le Mans* kaj ankaŭ eko-arkitektura bieno.

Ĝia fruktarbejo situas en la vilaĝo *Ségrie* ĉe la unuaj flankoj de la montetoj Mansaj Alpoj.

Kvin hektaroj da horto estas kultivataj laŭ ekokultivo, alternigante arbovicojn kaj aroman plantaron kaj fruktarbustojn.

Tio limigas la disvastiĝon de malsanoj kaj antaŭenigas biodiversecon serĉante ekvilibron.

Tiel en la fruktarbejo oni trovas pirojn "de Giroufle", "de Cuisse-Madame" aŭ de "Comtesse de Paris", pomojn, prunojn "Reine-Claude" kaj ankaŭ oni trovas blankajn frambojn kaj ribon.

Pri aromaj plantoj estas plantitaj rosmanero, svisa mento, zantoksilo, juniperoj, flordona sambuko kaj multaj aliaj.

La diverseco de tiu produktivo ebligas aromajn miksaĵojn kaj ebligas uzi ilin diversmaniere: puraj, en koktelo kaj ankaŭ en kuirarto.

Krome, tiu fruktejo gravas en la loka biodiverseco. Tiu ekologia engaĝiĝo ankaŭ estas la deziro antaŭŝirmi la viv-medion kaj ties loĝantojn inter kiuj "le Crapaud sonneur" kiu donis sian nomon al la Distilejo kaj kies kanzono foje estas aŭdebla en la fruktarbejo.

## La bufo "le Sonneur"

La flav-ventra bufo *le Sonneur*, vorto kiu signifas "kiu sonoras" estas protektata specio. La lastaj socioj en nia regiono loĝas proksime de *Ségrie*, vilaĝo kie situas la fruktarbejo. Tiu malgranda bufo apenaŭ 5 centimetrojn longa vivas en malprofundaj akvoj, en fosaĵoj aŭ en senfiŝaj marĉetoj.

Nia viv-maniero kaj homaj agoj kontraŭ la Naturo iom post iom detruis ĝiajn naturajn loĝlokojn. Tio motivis la posedantoj fosi protektatan marĉeton, kune kun la regiona naturparko *Normandie-Maine*, kun la Ligo por la Protektado de Birdoj kaj la regiona Konservejo de naturaj spacoj, kaj ankaŭ motivis ilin agadi por la protektado de tiu bufo.

Por aŭskulti ĝin: <https://www.youtube.com/watch?v=z-T5YdCoG9A>



Strato du Vert-Galant, le Mans




Du procedoj antaŭ distilado:  
fermentado aŭ macerado

## Vizito kaj gustumado

15/12/2024

Fotis membro de nia grupo



Preparado por gustumado

1887-2023

## La artefarita lingvo Esperanto kaj evoluo de kvar naturaj lingvoj

Mi elektis kvar naturajn lingvojn pro tiuj motivoj:

-La eŭska ĉar mi havas memorojn de ĝia ĉeesto dum la lukto kontraŭ la hispana katolika faŝismo;

-La hebrea ĉar mi memoris, ke la kreanto de cionismo, Theodor Herzl, ne akceptis ĝin. Studante tiun fakton, mi konas plej bone lian starpunkton;

-La makedona ĉar mi parolis bulgare (inter 1965 kaj 1993) en mia familio kaj en la plendaj burooj de la centra komitato de la bulgara komunista partio, sen fali en la morala marĉo de la reala leninismo, kaj post ĝia kolapso, de la aŭtentika kapitalismo;

-La valencia ĉar ĝi havas rolon nur post la morto de generalo Francisco Franco kaj dum tre mallonga momento.

Fine Kartezio havis interesan opinion pri artefarita lingvo.

Sekvante la kronologian historian disvolviĝon de la artefarita lingvo Esperanto kaj de kvar naturaj lingvoj (la eŭska –parolata en la nordokcidenta parto de Hispanio kaj en la sudokcidenta parto de Francio, la hebrea, la makedona kaj la valencia), mi opinias, ke la malsamecoj inter artefaritaj kaj naturaj lingvoj estos korektitaj, aŭ nuancitaj.

### Unua parto : 1887-1918

La jaro 1887 signalas la naskiĝon de la artefarita lingvo Esperanto kun la eldono en Moskvo de la rusa libro *Meĵdunarodni jazik*, [La internacia lingvo]. La sukceso de la facila kaj efika lingvo Esperanto kiel ilo klarigas ĝian grandan kaj viglan disvolviĝon ĝis la unua mondmilito, eĉ inter blinduloj kaj kuracistoj, matematikistoj, ktp.

Tia vera ŝpruco de uzoj korespondis al la duobla bezono de internacia kompreno ene de la klera klaso kaj ene de la laborista klaso por konkeri la praktikan eblecon komuniki tuje kaj senpere. Pro tio, institucioj, inter ili « Touring club », ktp, akceptis Esperanton.

La unua mondmilito signifis falon de homaj iluzioj pri la supoza saĝeco de multaj politikoj kaj religioj. Eble tiu mensa pesimismo kontaĝis ankaŭ la gravecon de iu internacia lingvo por la komunuma kompreno, fortigante la revenon al la nacio, al la naciismo, kiu tamen estis unu el la motivoj de la mondmilito.

Tiu klarigo ne funkciis pri la eŭska lingvo. Ĝi estis kaj persistis en sia stato de lingvo parolata precipe de kamparanoj, ekstere de la urboj. Tiu lingvo estis sen intereso por la kleraj eŭskoj. Ekzemple, Miguel de Unamuno, la fama intelektulo, lingvista kaj influa en la politika tavolo, autaŭvidis la malaperon de tiu lingvo (kiun li scipovis paroli), en 1911 !

Koncerne la hebrean lingvon la problemo estis solvita de Theodor Herzl kies libro *La Juda Registaro* en 1896, indikas: «Tamen ni ne scipovas paroli hebree inter ni mem. Kiu inter ni scipovas sufiĉe da hebrea lingvo por peti trambileton? Neniu estas kapabla diri ĝin [...] La lingvo kiu estas la plej uzata en la vivrilatoj entrudiĝos, sen perforto, kiel grava lingvo. » (esperantigita laŭ la argentina

traduko, paĝo 91). Pri la elekto de iu ebla teritorio por la setlado de dekoj da miloj da judoj, Theodor Herzl pensis pri Argentino aŭ Palestino.

Tamen li preferis tiun lastan landon «Por Eŭropo ni konstruus tie bastionon kontraŭ Azio; ni estos al la servo de la antaŭpostenoj de la kulturo kontraŭ la barbareco.» (same p. 46).

La ideo de Herzl estis ŝanĝita rilate la lokon kaj la lingvon en la dua juda kongreso en 1897 en Bazelo. La hebrea lingvo estis elektita kun «La akcelado pere de taŭgeblaj rimedoj de judaj setladoj de kamparanoj, metiistoj kaj komercistoj en Palestino.» Palestino, aŭ Ciono, donis la nomon de «cionismo», kun la vido de barbareco unuiĝita al la loĝantoj de Palestino, la estontaj militoj estis jam skribitaj en la cionismo.

La du modifoj havos profundajn sekvojn.

Pri la loko, Palestino estis en situacio de latentaj militoj inter angloj kontraŭ araboj kaj judoj kontraŭ araboj kaj (de tempo al tempo) kontraŭ angloj. La projekto de Herzl estis klara eŭropa koloniismo.

Pri la lingvo, en Palestino la judoj –loĝantoj ekde jarcentoj– parolis arabe, la plimulto de la judaj kolonianoj venis el Rusio kaj el aliaj apudaj landoj. Ili havis preskaŭ perfektan scion de la rusa aŭ jidiŝa lingvo. La tri lingvoj estis naturaj, sendube.

La elekto de la hebrea lingvo, pere de preparitaj instruistoj, signifis foriri dubojn kaj kritikojn pri cionismo. Pro tio, la hebrea lingvo estis artefarita. Politike ĝi celis cerblavadon favore al la cionismo.

Ne estas surprizo la longa negativa reago de Zamenhof en lia artikolo de 1901 «Hilelismo projekto de solvo de la hebrea demando». Se li eraris, unuavide, «cionismo, rapide krevos kiel sapveziko», tamen, Zamenhof antaŭvidis ke la hebrecio povus akiri memkonscion danke al hilelismo: la toleremo, «lumaj kaj altspiritaj esperoj» (*Mi estas homo*, Serio Scio, pp. 96, 94)

La makedona lingvo, ekde 1887 ĝis 1918 estis nur varianto aŭ dialekto de bulgara lingvo.


Preskaŭ la saman sorton konis la valencia lingvo, kiel dialekto de la katalana lingvo. Paradokse, Blasko Ibaniez [Blasco Ibañez], verkisto kaj politikisto favore al la aŭtonomio de la provinco de Valencio komence de la XXa jarcento ne aludis al la ebla rolo de la valencia lingvo en siaj planoj pri la socia sistemo, por kiu li mem luktis.



La valencia flago

А Б В Г Д Ѓ Е  
Ж З С И Ј К Л Љ  
М Н Њ О П Р С Т  
К У Ф Х Ц Ч Џ Ш

La makedona alfabeto



La eŭska flago

א ב ג ד ה ו ז ח ט י כ ל מ נ  
Mem Mem Lamed Kaf Dalet Yod Tet Qof Dages Yer Sin Dait Qofit Beit Aleph  
נ ו ס ע פ ק ר ש ת  
Ter Sin Resh Qof Tet Tav Peh Fei Ayin Samekh Mem Shin

La hebrea alfabeto

**Verkis Frank Mintz.**

*Daŭrigo en la venonta bulteno...*



## Lerni lingvojn aperigas novajn kolorojn

La eksperimento estis farita ĉe la Tsimanes (Ŝiman), izolita etno en la bolivia Amazonio, kiu tradicie ne distingas inter bluo kaj verdo. Skipo de germanaj kaj svisaj psikologoj fakte malkovris, ke inter la anoj de tiu etno tiuj, kiuj lernis la hispanan kiel duan lingvon, komencis distingi la du kolorojn, kaj uzi malsamajn vortojn por indiki ilin.

Plie, anstataŭ prunti vortprovizon el la hispana, ili uzis vortojn el sia propra lingvo por priskribi ĉi tiujn kolorojn.


Kaj ĉi tiu nova sensaĵo eĉ igis ilin iĝi pli precizaj priskribante nuancojn de flavo kaj de ruĝo!

Estas pruvo, laŭ la esploristoj, ke la akiro de dua lingvo ebligas aliron al konceptoj nekonataj en onia kulturo.

Jes, lerni novan lingvon vere helpas vidi la mondon alimaniere.

*Epsilon n-ro 32 – februaro 2024, franca magazino de sciencaj aktualaĵoj.*

<https://www.epsilon.com>



# UNIVERSALA DEKLARACIO

## DE LA HOMAJ RAJTOJ

### Artikolo 1

"Ĉiuj homoj estas denaske liberaj kaj egalaj laŭ digno kaj rajtoj. Ili posedas racion kaj konsciencan, kaj devus konduki unu al alia en spirito de frateco"



### DEKLARO DE LA CENTRO POR ESPLORO KAJ DOKUMENTADO PRI MONDAJ LINGVAJ PROBLEMOJ (CED) OKAZE DE LA 75-A DATREVENO DE LA UNIVERSALA DEKLARACIO DE HOMAJ RAJTOJ

*Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED).*

La Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj eksplicite malpermesas diskriminacion bazitan sur lingvo koncerne ĉiujn rajtojn listigitajn en la Deklaracio.

Ĉi tiuj inkluzivas egalan protekton sub la leĝo; preventado de arbitra enmiksiĝo kun privateco, familio, hejmo aŭ korespondado; libereco de esprimo (inkluzive de la rajto serĉi, ricevi kaj transdoni informojn kaj ideojn per iu ajn komunika rimedo kaj sen konsidero al landlimoj); egala aliro al publikaj servoj en la propra lando; kaj la ekonomiaj, sociaj kaj kulturaj rajtoj esencaj por persona digno kaj libera personeca evoluo.

Aldone, la Deklaracio agnoskas la prioritaton de gepatroj en elektado de la speco de edukado provizita al iliaj infanoj. Tamen restas tiel, ke lingvo tre ofte estas la bazo por neegala rekono kaj protekto de homaj rajtoj de individuoj. Parolantoj de minoritataj lingvoj multe pli verŝajne spertas neadon aŭ limigon de tiuj rajtoj surbaze de lingvo.

Dum la Deklaracio restas mejloŝtono en la evoluo de universalaj homrajtaj normoj, multo restas farenda. Estis ripetaj kaj oftaj alvokoj por plifortigitaj iniciatoj de Unuiĝintaj Nacioj por plibonigi la agnoskon kaj protektadon de minoritataj homaj rajtoj, pro la malboniĝantaj kondiĉoj rilate al homaj rajtoj spertataj de multaj minoritataj grupoj tutmonde. Subtenante tiajn klopodojn, ekzemple la Projekton de Tutmonda Konvencio pri la Rajtoj de Minoritatoj, ni krome emfazas, ke lingvaj homaj rajtoj ankaŭ postulas la enkondukon, en ĉiu jurisdikcio, de inkluzivaj, egalecaj lingvaj politikoj, kiuj devus esti regule kontrolataj kaj taksataj.

Ĝisdataj komentarioj kaj rekomendoj por plifortigi la efektivigon de lingvaj homaj rajtoj estis prezentitaj kaj diskutitaj de diversaj internaciaj fakuloj, inkluzive de akademiuloj kaj re-prezentantoj de la civila socio, en la 9-a Nitobe-Simpozio, organizita de CED en la Universitato de Torino, Italio, 28-29 julio 2023.

La 10-an de decembro, 2023

<https://interlingvistiko.net/>